# CNT KAJ LA STRIKO DE LA KANADA

En 2019 oni memoras la strikon de La Kanadano, turnopunkton por la laborista movado en Hispanio. En ĝi ĉefrolis la liberecana sindikato Nacia Konfederacio de la Laboro (Confederación Nacional del Trabajo), unu el la plej fortaj laboristaj organizaĵoj en Eŭropo. Fondita en Barcelono en 1910, ĝi estis alternativa, revolucia kaj efika amasorganizaĵo, kiu sukcesis bremsi la daŭrajn fiaskojn de la laborista batalo, kaj imagi novajn atingeblajn celojn.[1]

La naskiĝo de CNT baziĝis sur centoj da historiaj spertoj kaj luktoj. Kelkaj individuaj, aliaj kolektivaj kiel la laboristaj societoj de rezistado, multaj el ili malsukcesis. Ekzemple, en 1902 oni lernis, ke nepras organiziĝi por adekvate kunordigi strikon. Ankaŭ en 1909 la strika komitato en la tiel nomata Tragika Semajno komprenis, ke necesas kunordigo en la tuta Iberia Duoninsulo. Tiu evoluo sekvis la fadenon de Bakunin kaj de la Unua Internacio. Interalie, oni parolis pri rekta agado, ĝenerala striko, bojkoto kaj sabotado. Rekta agado signifis eviti perantojn, por mastrumi la konflikton. Strikoj decidiĝis sen ilin komuniki al la aŭtoritatoj, kaj oni akceptis pritrakti la aferon nur kun tiu, kiu solvos ĝin, nome la proprietulo de la fabriko. Ŝlosila principo estis ankaŭ solidareco. Pri tio temis la artikolo 1 de la statuto de CNT. Solidareco kun la strikoj en aliaj sektoroj de la ekonomio, sed ankaŭ kun tiaj eventoj en aliaj partoj de la lando. Tia agado endanĝerigis la interesojn de la burĝaro, kaj tial baldaŭ post sia fondo CNT devis iĝi subtera, same kiel okazos en aliaj momentoj de sia historio.

Du elementoj gravas por kompreni la sukceson de CNT. Unue, ĝiaj adaptiĝ-kapablo kaj subteno al la sociaj retoj de solidareco, kiuj jam ekzistis en la kvartaloj. Tiel la sidejoj de la sindikato fariĝis punktoj de renkontiĝo inter la laboristoj. Apud fabriko, en la kvartalo estis ofte sindikato kaj kultura centro kiel ateneo aŭ raciisma lernejo[2]. En tiaj lokoj oni lernis pri solidareco, reciproka subteno kaj komunuma spirito ene de la laboristaj kvartaloj. Due, gravis ĝia organiziĝo kiel unusola sindikato. Antaŭ CNT ekzistis multaj sindikatoj de la sama profesio en malsamaj kvartaloj kaj ankaŭ depende de la speco de laboro. Oni decidis unuigi ilin ĉiujn en ununura sindikato, kio ege faciligis la organizadon de la protestoj. Krome, tio signifis solidarecon inter la malsamaj profesioj. Kvankam CNT celis kunordigi la tutan laboristan movadon, gravis ankaŭ la socialista sindikato Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj (Unión General del Trabajo, UGT). Tamen, en kelkaj regionoj, kiel Katalunio, CNT fariĝis la ĉefa sindikato.

Malgraŭ la hispana neŭtraleco dum la Unua Mondmilito (1914-1918), tiu konflikto ege influis Hispanion. Ekonomie, la fabrikoj liveris produktojn al la du batalantaj flankoj. Tiumaniere riĉiĝis la loka burĝaro, ĉefe en Katalunio. Dume, tio ne signifis plibonigon de la malfacila soci-ekonomia situacio de la laboristoj (kaj de la kamparanoj). En epoko de senlaboreco ili havis nek ŝtatan helpon,

1 Eble anekdote, CNT rekomendis al siaj membroj lerni Esperanton por rekte komuniki kun la laboristoj en aliaj landoj. Kaj ĝi ankoraŭ tion faras.

2 Temas pri tiaj lernejoj, bazitaj sur la ideoj de Fourier kaj Kropotkin. En epoko kiam la plejparto de la lernejoj estis mastrumataj de la Eklezio, ili subtenis la racian kaj empirian konon fronte al tiu dogma kaj metafizika. ĉefa figuro en tiu pedagogia movado estis Ferrer i Guàrdia.

nek eblojn por akiri edukadon. Ili tute dependis de siaj propraj retoj de solidareco. Krome, la Ŝtato ne zorgis pri la sankondiĉoj en la fabrikoj, ne okupiĝis pri la kunamasiĝo en iliaj loĝejoj, kaj ne certigis la aplikadon de la priaj leĝoj, pri kiuj finfine respondecis praktike la burĝaro. Rezulte, en la industriigitaj areoj ofte la filoj de la laboristoj eklaboris kiam ili aĝis 8 aŭ 9 jarojn.

En tiu kadro en 1917 okazis revolucia ĝenerala striko kunorganizita de CNT kaj UGT. Oni pledis por plibonigo de la laborkondiĉoj kaj de la rajtoj de la laboristoj, sed oni ankaŭ celis socian transformiĝon. Samjare eksplodis la rusa revolucio, kiu influis la proletaron tutmonde. En tiu periodo, la Dua Internacio alfrontis krizon pro la Unua Mondmilito, ĉar preskaŭ ĉiu socialista partio subtenis la militan agadon de sia registaro tiel forgesante pri internaciismo. Dume, kelkaj laboristaj grupoj konsideris ke alvenis jam la momento de revolucia ŝanĝiĝo kaj decidis foriri el tiu Internacio. Inspiritaj de Moskvo, ili formis siajn komunistajn partiojn, kaj kreiĝis la Tria Internacio. El multaj landoj venis reprezentantoj de lokaj kaj naciaj asocioj por vidi kiel funkcias la rusa revolucio en la realo. Ankaŭ CNT tion faris. La raporto verkita de Ángel Pestaña (kiu cetere pritraktis la lingvan aferon dum sia vizito al Rusio[3]) ne estis favora. La soveta ŝtato ne respondis al la revoluciaj kriterioj defenditaj de CNT. Je la fino de 1922 en Berlino kreiĝos Internacia Laborista Asocio, iumaniere la daŭrigo de la Unua Internacio, kaj al ĝi decidos aliĝi CNT.[4]

En 1918 finiĝis la mondmilito, kaj senlaboreco draste altiĝis en Barcelono. La situacio por la laboristoj malpliboniĝis multflanke. En tiu kunteksto, en februaro 1919 unu el la du entreprenoj kiuj liveris elektron al Barcelono maldungis ok administrajn laboristojn, pro tio ke ili formis sendependan sindikaton. Tiu entrepreno estis konata kiel La Kanadano, ĉar ĝia ĉefa akciulo estis la banko de Toronto. Reage, la ceteraj laboristoj deklaris strikon ĝis la redungo de la maldungitoj. Siaflanke, la entrepreno decidis maldungi plian centon da laboristoj. Tio reaktivigis la solidarecajn retojn en la kvartaloj, kaj tiam CNT eniris la konflikton. Kiam la direktoro de la entrepreno eksciis ke inter la reprezentantoj de la laboristoj estas CNT-anoj, li tuj retiriĝis el la intertraktoj. Baldaŭ la striko ampleksiĝis al la alia elektra entrepreno de Barcelono. Du tagojn poste, la laboristoj de la gaz- kaj akv-entreprenoj aldoniĝis al la striko, kiu iom post iom etendiĝis al aliaj sektoroj. Fine ĝi fariĝis generala striko, kaj la urbo restis paralizita. Tiu paralizo atingis 70 % de la tuta kataluna industrio. En tiu kadro okazis centoj da arestoj de laboristoj. Post du monatoj la situacio iĝis neeltenebla kaj la hispana registaro decidis interveni. Ĝi devigis la direktoron de La Kanadano negoci kun la laboristoj kaj akcepti iliajn plendojn. La striko finiĝis kun la liberigo de miloj da laboristoj. La registaro, superfortita de la situacio, subskribis leĝon pri la 8-hora labortago, kaj tiel Hispanio iĝis la unua lando, kie la laboristoj atingis tiun historian celon[5]. Tio estis turnopunkto por la laborista movado. Fakte, la plejparto de la postaj strikoj celis interalie la aplikadon de tiu 8-hora labortago. Alivorte, la laboristoj ekde tiam povis argumenti ke la proprietuloj devas obei la leĝon. Krome, post la plenumiĝo de tiu rajto ekeblis batali por pli gravaj rajtoj.

La striko de La Kanadano estis granda sukceso por la laboristoj. Tamen, ili ankaŭ devis pagi prezon, ĉar la proprietuloj kaj la registaro ekkomprenis la gravecon de la anarkosindikatisma organizaĵo. Baldaŭ oni deklaris sieĝostaton, kaj la armeo okupis la urbon. En la venontaj jaroj celo estos detrui CNT-on, ankaŭ pere de sikarioj pagitaj de la proprietuloj por murdi la ĉefajn sindikatanojn. La liberecana movado kuraĝe respondos, batalante eĉ en la hispana milito.

**Xavi Alcalde**

---

3 Estis Pestaña kiu proponis al la Tria Internacio pristudi la eblan rolon de Esperanto en la asocio. Vidu Toño del Barrio "Anarhiisto proponis Esperanton al la komunista Internacio", Sennaciulo 2009 05/06, n-ro 1247-1248. https://www.nodo50.org/esperanto/artik89.htm

4 Inter la gvidantoj de CNT, unu el la plej skeptikaj pri la soveta stato estis la esperantisto Eleuterio Quintanilla.

5 Temis pri ĉefa celo de la tiutempa laborista movado, tre konata ekde la striko en Cikago en 1886, kiu naskis la Unuan de Majo. Poste, la kongreso de la Dua Internacio agnoskis gin kiel transversan celon de la tutmonda laborista movado.